

## Babilada rondo

... okazas je la 19-a.  
Aliĝu rekte ĉe la  
gastiganto mem.



Vendrede, la 2-an de  
decembro  
ĉe Sonia Daubercies  
Coin d'En Bas 5  
1092 Belmont  
079 649 88 86

\* \* \* \* \*

## AGENDU

28-an de aprilo 2012  
Ĝenerala Kunveno  
de SES  
en Vevey

Lunde la 9-an de  
januaro:  
*Decidota*

Lunde la 6-an de  
februaro

*Ĝenerala Asembleo*  
Lunde la 5-an de  
marto

*Decidota*  
Lunde la 2-an de  
aprilo

*Renkontiĝo en Le Magasin  
du Monde - Vevey*

## **Laŭzana Esperanto - Societo**


Poŝtfako - Case postale 246 \* CH - 1000 LAUSANNE 22  
+41 (0)76 411 14 55 \* +41 (0)21 647 29 28  
esperanto@citycable.ch \* [www.esperanto.ch/Lausanne](http://www.esperanto.ch/Lausanne)  
Poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8

Prez.: David Bühlmann \* 021 624 36 38 - Vicprez.: Charlotte  
Blanc Maillard \* 079 393 32 63 - Sekr.: Francisko Randin \*  
076 411 14 55 - Kasisto.: Sonia Daubercies \* 077 494 99 39

## **Informilo**

Decembro 2011 - n° 10

Sabate la 17-an de decembro  
Zamenhofa festo  
je la 11-a  
en la Maison de Quartier  
av. Dapples 50  
1006 Lausanne



## **Pri la Zamenhofa festo**

Aliĝu ĉe Françoise Pétermann

079 517 44 43 oŭ 021 652 08 45

ĝis la 12-an de decembro kaj ŝi diros al  
vi, kion alporti.

**Laŭzana Esperanto - Societo**

## La novaj vestoj de la imperiestro

(Marjorie Boulton laŭ Anderson)

2-a parto

Okazis por li tiel same kiel por la ministro, li rigardis kaj rigardis, sed ĉar estis nenio krom la malplenaj teksiloj, li povis nenion vidi.

"Jes, ĉu ĝi ne estas bela stofo!" diris ambaŭ fraŭdistoj kaj montris kaj klarigis la ravan desegnon, kiu tute ne estis.

"Stulta mi ne estas" pensis la viro, "do estas mia bona ofico, por kiu mi ne taŭgas? Tio estas tre stranga! Sed tion oni ne lasu iun senti!" kaj tiam li laŭdis la ŝtofon, kiun li ne vidis, kaj certigis al ili sian ĝojon pri la belaj koloroj kaj la rava desegno. "Jes, ĝi estas nepre plej dolĉa!" li diris al la imperiestro.

Ĉiuj homoj en la urbo parolis pri la belega ŝtofo.

Nun la imperiestro mem volis vidi ĝin, dum ĝi ankoraŭ estis en la teksilo.

Kun tuta aro da elektitaj viroj, inter kiuj la du maljunaj bonkoraj oficistoj, kiuj jam antaŭe estis tie, li nun iris al la du ruzaj fraŭdistoj, kiuj nun teksis per ĉiuj fortoj, sed sen ŝnureto aŭ fadeno. "Jes, ĉu ĝi ne estas grandioza!" diris ambaŭ bonkoraj oficistoj. Ĉu Via Moŝto vidias, kian desegnon, kiajn kolorojn!" kaj tiam ili montris al la malplena teksilo, ĉar ili pensis, ke la aliaj kredeble povas vidi la ŝtofon.

"Kion!" pensis la imperiestro, "mi vidas nenion! Tio estas ja terura! Ĉu mi estas stulta? Ĉu mi ne taŭgas por imperiestro? Ĉi tio estas la plej terura, kio povus okazi al mi!" "Oo, ĝi estas tre bela" diris la imperiestro, Ĝi havas mian plej

aprobon!" kaj li kapgestis kontente kaj rigardis la malplenan teksilon; li ne volis diri; ke nenion li povas vidi.

La tutan nokton antaŭ tiu antaŭtagmezo, kiam la procesio devis okazi, la fraŭdistoj sidis laborantaj kaj havis pli ol dek ses kandeloj lumigitaj. Oni povis vidi, ke ili estas forte okupitaj finretigi la novajn vestojn de la imperiestro. Ili ŝajnigis, kvazaŭ ili deprenus de la teksilo la ŝtofon, ili tondis en la aero per grandaj tondiloj, ili kudris per kudrilo sen fadeno kaj finfine diris: "Rigardu, nun la vestoj estas pretaj!"

Kun siaj plej distingitaj korteganoj la imperiestro mem venis tien, kaj ambaŭ fraŭdistoj levis unu brakon, kvazaŭ ili ion tenus, kaj diris: "Rigardu jen la pantalonon! Jen la robo! Jen la mantelo!" kaj tiel plu. "Ĝi estas malpeza, kiel araneaĵo! Oni devus kredi, ke nenio estas sur la korpo, sed ĝuste tio estas ĝia avantaĝo!" "Jes" diris ĉiuj korteganoj, sed ili povis nenion vidi, ĉar nenio estis.

(daŭrigota)



